1-4 folioj po/1-4 ark st	12.-	F
5 aŭ pli po/5 eller fler st	8.-	G
<b>Mangoj/måltider:</b>		
Buterpano kaj trinkaĵo/ smörgås och dryck	(21/4)	34.- H
Antaŭtagmeza kafo/ förmiddagskaffe	(22/4)	20.- I
Lunĉo/lunch	(22/4)	65.- J
Vegetara lunĉo/ vegetarisk lunch	(22/4)	65.- K
Posttagmeza kafo/ eftermiddagskaffe	(22/4)	20.- L
Supeo/supé	(22/4)	140.- M
Vegetara supeo/ vegetarisk supé	(22/4)	140.- N
Malkara supeo/ lågprissupé	(22/4)	44.- O
Antaŭtagmeza kafo/ förmiddagskaffe	(23/4)	20.- P
Lunĉo/lunch	(23/4)	85.- Q
Vegetara lunĉo/ vegetarisk lunch	(23/4)	85.- R

Supeoj kaj lunĉoj inkluzivas trinkaĵon kaj kafon  
Supéer och luncher inkluderar måltidsdryck och kaffe.

Pagu al poŝtgira konto 4814395-2, SEF-jarkongreso, kaj  
indikite la kodojn de la aĵoj por kiuj vi pagas.  
Betala till pg-konto 4814395-2, SEF-arkongreso, och  
ange koderna för posterna du betalar.

eller hur! En lågprissupé bestående av landgång kommer också att finnas. För den som vill finns nubble eller vin att köpa till. För beställning av supé eller övriga måltider, se separat ruta. Samtliga måltidsalternativ inkluderar lättöl eller vatten och kaffe eller te. För restaurangens planering är det nödvändigt med förhandsbeställning.

Ett flertal hotell finns i närheten av kongresslokalen. Beställning av hotellrum görs direkt hos hotellet, se separat ruta. För dig som söker ett billigare boendalternativ, rekommenderas vandrarhemmet Lagerlunda, som ligger en knapp kilometer från kongresslokalen. Vi har preliminärbokad ett hus på vandrarhemmet, så beställ så fort som möjligt och ange att du är deltagare i Esperantokongressen.

Om du behöver ytterligare information, ring till

Martin Hägerström,  
tel: 011/170503 eller  
Haldo Vedin,  
tel: 011/162687.

## Informoj por nesvedoj

La ĉi-jara kongreso okazos en la Popola Domo (Folkets Hus) en Norrköping dum la 21-a ĝis 23-a de aprilo. La Popola Domo situas proksime de la fervoja stacio. Pri la programo, pago de kotizoj kaj hoteloj, vidu apudajn artikolojn. Eksterlandaj partoprenantoj ne bezonas pagi la kongreskotizon. Hotelĉambro vi mendo rekte ĉe la hotelo. Se vi havas demandojn, skribu aŭ telefonu al:

Martin Häggström  
Axel Swartlings gata 92  
S-60378 Norrköping  
Tel: + 46 11 17 05 03

Aŭ:

Haldo Vedin  
Jordbrogatan 57  
S-603 64 Norrköping  
Tel: + 46 11 16 26 87

# Ĉina Akademio intencas fondi internacian universitaton

*Academia Sinica*, la Ĉina Akademio de Sciencoj, planas krei internacian universitaton pri scienco kaj tekniko en Pekino. La universitato povos ampleksi ĉiujn sciencojn sen limigo, kun emfazo komence pri administrado, ekonomiko kaj teknologio. La plano estas aprobita de la estraro de la Akademio de Sciencoj. Ĝi havas eksplicitan apogon de la Komisiono pri Scienco kaj Tekniko, kiu estas la plej supera instanco en Ĉinio pri tiaj aferoj kaj ordigita senpere sub la landa registaro.

La intenco nun estas serĉi kunlaboron kun eksterlandaj universitatoj kaj akademioj. Tiuj ĉi povos sendi instruistojn kaj studentojn al la internacia universitato.

Oni komencos per kursoj pri specialaj temoj, por poste paŝon post paŝo ampleksigi la kursaron. La universitato, almenaŭ komence, ne havos proprajn regulojn pri diplomigo: Kunlaboranta universitato, kiu sendis instruiston al Pekino, donos diplomon aŭ ateston pri eduko laŭ siaj propraj leĝoj kaj reguloj. Profesoroj el Pekino povos ankaŭ instrui (ekstermurajn) kursojn ekster Ĉinio.

*Academia Sinica* kaj la Komisiono pri Scienco kaj Tekniko ankoraŭ ne decidis pri buĝeto de la internacia universitato. Oni unue deziras atendi reagojn de eksterlandaj universitatoj kaj aŭtoritatoj. Intereso montrita flanke de la sveda registaro, svedaj edukaj aŭtoritatoj kaj svedaj altelejoj, universitatoj kaj akademioj tial povos havi signifon por la venonta evoluo. La Ĉina Akademio de Sciencoj volonte akceptos, ke sveda universitato fariĝu unu el la fondantoj de la planata universitato. Svedio havas, kiel neŭtrala kaj paca lando, bonan reputacion en Ĉinio.

La gvidantaro de la universitato estos varbita el pluraj landoj, kun tri prezidantoj, el kiuj unu de *Academia Sinica* kaj du el eksterlandaj

universitatoj, kiuj deziras esti kunfondantoj de la nova universitato en Pekino.

La prezidanto de la universitato de Uppsala, rektoro Martin H:son Holmdahl, profesoro pri anesteologio, en letero de 1988-12-05 al *Academia Sinica* akceptis fariĝi unu el la tri prezidantoj.

La estro de la Studentakcepta kaj registra sekcio de la universitato de Uppsala, Einar Lauritzen, en memorigaj notoj de 1988-11-15 detale klarigas la formalajn kondiĉojn, sub kiuj profesoro el la universitato de Uppsala povos instrui en la internacia universitato en Pekino, same kiel tiujn, sub kiuj studento el Uppsala povos partopreni en kursoj sine de la nova universitato instruotaj de profesoroj el aliaj universitatoj. Tiel la kunlaboro inter la universitato de Uppsala kaj la nova universitato ekhavas firman bazon ankaŭ formale.

La internacia universitato, kun la nomo *Internacia Esperanta Scienc-Teknika Universitato* (mallonge *IE-STU*), havos Esperanton kiel ununuran labor- kaj studlingvon. Esperanto estas studata en multaj universitatoj kaj altelejoj en Ĉinio. Kiam mi estis tie, mi renkontis multajn studentojn, kiuj post okmo-

nata studo parolis bonegan Esperanton kaj povis interparoli tre nuancite en tiu ĉi lingvo.

Estas emfazinde, ke la universitato en sia komenco estos funkciigita malgrandskale. La intereso flanke de ĉinaj studentoj certe estos tre granda, kaj *Academia Sinica* faros striktan elekton. Tiuj studentoj, kiuj estos akceptitaj, tial havos kaj tre bonan konon de Esperanto, kaj tre bonajn antaŭkonojn pri la temoj, kiujn ili deziras studi. Instrui supozeble estos neordinare interese kaŭze de tio.

*Academia Sinica* interesiĝas, kiel jam menciite, pri reagoj kaj esprimoj de apogo por siaj planoj fondi la novan *IESTU*. La iniciato de la akademio estas unika, kaj devas interesi ĉiujn, kiuj deziras antaŭenigi internacian kunlaboron pri edukado. Estas grave, ke intereso ekzistanta ankaŭ estos formulita kaj ke tiaj opiniesprimoj alvenos al la akademio. Skribajoj povas esti senditaj al la adreso:

*Academia Sinica*,  
Sciencista-Teknikista  
Esperanto-Asocio,  
52 Sanlihe,  
100864 Beijing, Ĉinio.

C.O Kiselman

Skövde Esperantoklubb anordnar

## Veckoslutskurser

på Västerhöjdsolan, Skövde (ingång C)  
lördagen den 11 mars och söndagen 12 mars  
kl 10.00-15.30.

Vi har kurser för nybörjare, fortsättnings- och  
konversationskurser. Under pauser bjuder  
klubben på smörgås och dryck.


Anmälan senast den 23 februari till tel:  
0500/164 51. Ingen deltagaravgift.

# Du antologioj kaj unu plenverkaro



## Itala Antologio

La vorto "Italio" por multaj homoj estas proksime ligita al la vorto "kulturo". Kiam mi malfermas la Italan Antologion, mi tuj rekonas plurajn nomojn, kiuj ludis gravan rolon ne nur en la eŭropa literaturo, sed en la monda historio ĝenerale. En la libro mi povas legi "La kanton de la kreitaĵoj" de Sankta Francisko, novelojn el "Dekamerono" de Boccaccio, "Pensojn" de Leonardo da Vinci, kaj "Sennombra estas la



## Aŭstralia Antologio

La literaturo de la eŭropdevenaj enloĝantoj de Aŭstralio havas komunan historion kun la ĝenerala eŭropa literaturo. Ĝi tamen sufiĉe frue klopodis diri ion tipe aŭstralian, kio elkreskis el medio tute malsama ol Eŭropo. En la aŭstralia literaturo ni tial trovas freŝajn epizodojn el la vivo de koloniistoj, orserĉantoj, bonkoraj ŝtelistoj kaj junaj malliberuloj, kiuj vivas en socio, kiu ankoraŭ ne trovis sian identecon. Legante la novelojn de la pasinta jarcento mi ne sciis ĉu mi ridu aŭ ploru, simple ĉar la stilo estas tiel kortuŝa, plena de amo al la lando kaj ĝiaj enloĝantoj.

La libro enhavas ne nur novelojn el la pasinta jarcento, sed novelojn kaj poezion el ĉiu epoko ĝis hodiaŭ. Aperas ankaŭ novelo de aborigena verkinto.

Aŭstralia Antologio estas trezorejo por ĉiu, kiu volas legi mallongajn, facilstilajn kaj ege amuzajn rakontojn, en kiuj ne mankas la problemetoj rekoneblaj por ĉiuj homoj.

Leif Nordenstorm

## En barko senpilota

Tiu ĉi 874-paĝa libro kun la subtitolo "plena originala poemaro" certe estas leginda por ĉiu, kiu jam konas aŭ volas ekĝustumi la poezian trezoron de William Auld, sendube la plej elstara nun vivanta poeto de Esperantujo. Ĝuu la optimismon de junulo: "Nu hom", vi estas tamen Homo:/ ne rampas vi, nek krablas,/ sed paŝas, takte kiel metronomo./ Rezoni vi kapablas." (p.154.) Ĝuu la daŭran vivoĝojon de la matura, sed iom laciĝinta viro: "Forgesi pri la tedaj taskoj/ Ligita al salajro./ Varmigi manojn de l' animo/ Ĉe arda amofajro." (p. 702.) En la libro aperas kaj antaŭe eldonitaj poemoj, kaj multaj, kiuj nun unuan fojon aperas presite.

Plivalorigas la verkon ses enkondukoj de Aldo de Giorgi, Régulo Pérez, Edwin de Kock, Rejna de Jong, Marjorie Boulton kaj Henry Vatré, kiuj interese kan en tute malsamaj manieroj, laŭde kaj mallauĉe, traktas la poeton kaj liajn verkojn.

Jen libro por poeziamantoj.

Leif Nordenstorm



stultulamaso"-n de Galileo Galilei. Tiujn sekvas dekoj da italaj verkistoj, ne same konataj internacie, sed certe indaj je konatiĝo. Aperas ankaŭ la vivrakontoj de la verkistoj, kaj bildoj de kelkaj. Legu kaj ĝuu.

Leif Nordenstorm

## Klubo Cent

Lennart Lagerkrantz, Falun	100:-
Malte Smith, Kävlinge	100:-
Anna Greta Strönnne, Malmö	100:-
Jan Strönnne, Malmö	100:-
Gustav Nygård, Göteborg	200:-
Ivar Andersson, Hälleforsnäs	100:-
Olle Olsson, Lund	100:-
E. Nilsson, Malmberget	100:-
Ove Kleborgh, Hässleholm	100:-

## Tra la lando

### Granda literatura trezorejo je via dispono

Antaŭ jam sufiĉe multaj jaroj, mortinta samideano E.S. Nilsson, tekstilindustria laboristo, en sia testamento asignis konsiderinde grandan monsumon por ebligi en Gotenburgo centran bibliotekon de bonkvalita literaturo en Esperanto, favore al la Esperanto-movado en Gotenburgo.

La kapitalon administras la Esperanto-Alianco de Gotenburgo, kies Fondusa Komitato prizorgas kontinuan elekton kaj aĉetadon de libroj. Laŭ interkonsento la Esperanto-Alianco deponas la tutan librostokon ĉe la Urba Biblioteko de Gotenburgo, kies ĉefbiblioteko en sia faka salono n-ro 7 havas i.a. ĝeneralan literaturon pri lingva kaj literatura sciencoj, lingvokursojn, k.s.

Nun la Fondusa Komitato povas ebligi al esperantistoj ne nur en Gotenburgo, sed kie ajn en Svedio, pruntepreni Esperanto-literaturon el nia ĉefbiblioteko laŭ katalogo eldonita en julio 1988. Ĉiu el la svedaj publikaj bibliotekoj (ankaŭ nomataj popolaj bibliotekoj) estas preta prizorgi tion al vi. En plej multaj kazoj tia t.n. distanca prunto estas senkosta. Esceptoj estas kelkaj grandurbaj bibliotekoj, kiuj postulas varian malgrandan kotizon por sia perado. Temas pri sumeto je du aŭ tri kronoj.

Informe ni povas mencii, ke la kapitalo de nia fonduso nun sumiĝas je pli ol 100.000 kronoj. Ĉiun jaron ni povas aĉeti kaj deporni librojn uzante ĉ. 80 % de la kapitala rento.

Guste nun oni baldaŭ liveros novajn librojn – inter kvindek kaj cent ekzemplerojn – kiuj post 3-4 monatoj estos disponeblaj sur la bretoj de la ĉefbiblioteko. Se vi dezirus la katalogon aŭ pli poste la povas skribi aŭ telefoni al mi.

Kompletajn, novajn katalogojn eldonas nia ĉefbiblioteko proksimume ĉiun duan jaron.

Lennart Åberg  
Tycho Brahes gata 19,  
415 17 GÖTEBORG  
Tel: 031/48 95 97

### Nya veckoslutskurser för alla i Skövde-skola

Veckoslutskurserna varje vår och höst hos Skövde Esperantoklubb har blivit stora framgångar. I höstas deltog ett 50-tal personer i alla åldrar i nybörjar-, fortsättnings- och konversationskurserna.

Den 11 – 12 mars återkommer klubben med nya sådana kurser och hoppas på deltagande från hela landet. Kurserna är helt avgiftsfria – tvärtom bjuder klubben båda dagar-


na på rikligt med goda smörgåsar och druck under pauserna.

En glad och kamratlig stämning brukar prägla kurserna, som för många deltagare betytt första steget in i Esperanto-världen. Medlemmar i Skövde Esperantoklubb brukar alternera som lärare.

### Televida kasedo: Astrid Lindgren en Esperanto

Kiel memorigilon pri la Jubilea Jaro de Esperanto mi ricevis antaŭ ne-longe televidan kasedon, sur kiu registriĝis unu el la eventoj de la varsovia UK 1987: La pola aktorino Jadwiga Gibczynska laŭlegas ĉapitron el la esperanta versio de "Bröderna Lejonhjärta". La jaro 1987 estis ankaŭ memorfesta jaro de Astrid Lindgren, kaj pro tio mi donacis la bendon al la Urba Biblioteko de Stockholm, kiu dediĉis specialan ĉambrom al ŝiaj verkoj. La ĉambro troviĝas en la biblioteka filio ĉe Medborgarplatsen.

Kerstin Rohdin



Veckoslutskurserna i Skövde har deltagare i alla åldrar. Skövde Nyheters foto är från den senaste kursen.

### Tryckfelsnisse

Tyvär så var tryckfelsnisse framme i våra spalter i nr 8/88.

Postgironumret som ni skall betala in UEA-avgiften till, är **14 74 29-5** och telefonnumret till Lisbet Andreasson, som lämnar alla upplysningar i denna fråga, är **0415/501 52**.

## Regionträff i Nybro

Söndagen den 6 december samlades man från fyra orter i Sydöstra regionen till en träff i den moderna Jutegården. Linnea Edsenius berättade om arbetet i Nybro. Kerstin Rohdin informerade om SEF:s senaste styrelsesammanträde och om arbetet med klubbenkäten. Harold Brown bjöd på ett intressant och levande program kring buddism, där han bl a presenterade en basanalytisk av Livets Hjul. Träffen samlade ett 25-tal personer.

## "En värld utan gränser"

I Rønne på Bornholm, Danmark, träffades under helgen 15-16 oktober 1988 ett antal representanter från olika ideella organisationer i Danmark och Sverige till en gemensam konferens under temat "En värld utan gränser".

Deltagande danska organisationer var Ungdomens Fredsförbund (under bildande), Bahá-i-Samfundet på Bornholm samt Esperantoföreningen i Köpenhamn. Från Sverige deltog representanter för Malmö FN-förening, Esperantoföreningarna i Lund och Malmö, samt konferensens initiativtagare, Ungdomens Fredsförbund och Bahá-i-Samfundet, båda från Malmö.

Konferensdeltagarna hade till uppgift att skapa en grundläggande plan för ett årligen återkommande ungdomsforum för kurser och konferenser som kan medverka till att höja medvetenheten och förståelsen inför gemensamma och allmänmänskliga problem inom områden som t ex miljö, fred, kultur, livskvalitet, m fl.

Ungdomsforumet skall i första hand rekrytera deltagare från nord-europeiska länder, speciellt kring Östersjön, i syfte att samla ungdomars intresse för kreativa insatser som kan leda till konstruktivt nyttänkande kring sådana frågor.

Från Malmö Esperantoförening

deltog Agneta Lund och Lennart Magnusson, och från Södra Distriktet Anna-Maria Lange.

Det framgick av diskussionen att framförallt Bahá-i kraftigt stöder Esperanto som ett av konferensspråken och att stort intresse visades även från de övriga, och då främst Ungdomens Fredsförbund.

Anna-Maria Lange visade en instruktiv videofilm om Esperantos utbredning i världen och alla deltagarna försågs med aktuellt material om språket. Huvudintrycket av konferensen var mycket positivt ur alla synpunkter och till nästa konferens kommer utan tvivel ett deltagande från vår förening att vara angeläget.

Agneta Lund

## Regiona Renkontiĝo Småland/Blekinge

Regiona Renkontiĝo Småland/Blekinge okazis la 7-an de novembro en Växjö. Tiujn renkontiĝojn ni provas aranĝi du fojojn en la jaro. Pli ol kvindek personoj partoprenis. Aparta allogaĵo estis prelego de nia pola gastulo Stanislaw Burba, kiu prezentis la lastan el serio de prelegoj, kiujn li faris dum sukcesoplena turneo en Svedio. Dum la turneo li alparolis pli ol 600 homojn en lernejoj, pensiulaj centroj kaj Esperantoklubo. Ne ĉiuj aŭskultantoj komprenis Esperanton kaj necesis tial traduki lian prelegon en la svedan, neceso, kiu donis bonegan ŝancon al la ĝenerala publiko kontaktigi kun Esperanto kaj konstati, ke la lingvo efektive funkcias kaj ne estas nur diletanta hobia. Aparte granda aŭskultantaro troviĝis en Falköping.

Dum la renkontiĝo ni kaptis la okazon atentigi pri la 8-semajna kurso, kiun Lars Forsman printempe aranĝos en Karlskoga, kaj pri la loterio, kiun organizas Lennart Svensson. Ni sukcesis vendi 150 lotojn.

Kerstin Rohdin

## DONACOJ

# Bonvenaj donacoj

## Ragnar Hjorth testamentis 10.000 kronojn al SEF

En decembro 1988 SEF ricevis donacon je 10.000 kronoj el la postlasaĵo de Ragnar Hjorth. Laŭ lia deziro, la donaco estu uzota por laboro inter instruistoj.

Danke al tiu donaco kaj kelkaj aliaj en la jarfino, la kompleta sumo de donacoj al SEF dum 1988 atingis 52.977 kronojn, kiu certe estas rekordo. Kromaj 5.000 kronoj estas donacitaj al "Klubo Cent".

SEF kore dankas la membraron pro la tre bonvenaj donacoj. Sen ili ne eblas federacia funkciado. Precipe la nun altigita lukosto por Esperanto-Centro tre streĉas la ekono-

mion de SEF (por 1989 la kosto estos 52.892 kronoj). Sed 12 membroj, kluboj kaj distriktoj donis po 1.000 kronojn por solvi la lukostajn problemojn.

Novaj donacoj ĉiam estas bonvenaj al la poŝtĝira konto de SEF 2012-3.

## Nova granda donaco de Sven Sundin

Denove inĝeniero Sven Sundin, Växjö, donacis valorajn akciojn al SEF. Tiun ĉi fojon temas pri cent akcioj de Svenska Handelsbanken. Je la tempo de donaco, ĉiu akcio valoris 140 kronojn. La suma valoro de la donaco do estis 14.000 kronoj.

### "Letero el Bialistoko"

La titolo estas simbola. La letero venas al vi el Varsovio, ĉar tie ĉi havas sidejon la Fondumo Zamenhof, starigita por la preparlaboroj lige kun la plano konstrui Centron Zamenhof en Bialistoko. Kiel sciante, tiu granda projekto estis anoncita dum la Jubilea Esperanto-Kongreso en Varsovio kaj ĉi-jare unuanime proklamita fare de la Komitato de UEA kiel grava celo de la Esperantomovado.

Antaŭ ol komenci la konstruon de la Centro Zamenhof en Bialistoko, oni devas fronti grandegan laboron, en kiu ni, esperantistoj, povas internaciskale partopreni diversmaniere. Interalie jam venis la tempo komenci kolektadon de libroj por venonta granda biblioteko kaj de eksponaĵoj por venonta muzeo. La estraro de la Fondumo prilaboris la regularon por tiu agado. Mi aldonas ĝin por diskonigo. Donacojn, librojn kaj dokumentojn oni povas sendi rekte al Bialistoko, laŭ la adreso: Pola Esperanto-Asocio, ul. Lipowa 14, PL-15-427 Bialistoko, Pollando.

Dua ebleco kontribui estas monpago, kiu, kiel rivereto enfluanta grandan riveron, subtenos la grandiozan ideon konstrui hejmdomon por Esperanto en ĝia patrolando. Jen la konto: BankPKOSA, Illo/Warszawa, ul. Kredytowa 3, Nr 5.01031.9002061

Ĉiu mondonacinto, sendepende de la sumo, ricevos specialan dankleteron. La plenan liston de donacintoj mi prezentos en ĉiu sekva "Letero el Bialistoko".

Tria eblo partopreni la realigon de la Bialistoka Centro estas kontribui per ideoj, rimarkoj, sugestoj kaj proponoj pri la Centro mem. Jam venis kelkaj leteroj kun valoraj atengitoj. Komuna pensado valoras same grave kiel financa apogo. Pro

tio, apud la "Libro de donacoj" ekestas "Libro de ideoj", kie estos notita ĉiu propono kaj sugesto.

Mi finas la unuan leteron per esperdona informo: Fondumo Zamenhof direktas al la Komitato por Dekado de la Monda Kulturo de UNESCO la proponon enkadrigi la projekton pri la Centro Zamenhof en Bialistoko en la programon de tiu Komitato. La unua kunsido de la Komitato okazos en Parizo dum januaro 1989. Mi informos vin pri la rezulto.

Kaj kio okazos en Bialistoko? Vi povas aŭdi tion en Esperanto-Ekspreso de Radio Polonia ĉiun semajnfino.

Kun multaj salutoj el Pollando

Ewa Siurawska  
Direktoro de la  
Fondumo Zamenhof

### Nova urba prospekto

La turisma oficejo de Jyväskylä komence de 1989 aperigos novan prospekton pri la urbo. Se vi volas havi ĝin, adresu vian peton al: Kaupungin matkailutoimisto, Vaupaudenkatu 38, SF-40100 Jyväskylä, Finnlando.

### Belaj broŝuroj

Esperanto-Asocio de GDR informas, ke la Agrikultura Ekspozicio de GDR eldonis la prospekton "Naturprotektado de Germana Demokratia Respubliko". Oni mendas la senpagan, sed multkoloran kaj dikan broŝuron de: Landwirtschaftsausstellung der DDR, Raschwitzer Strasse 11/13, Markkleeberg, DDR-7113, GDR.

Alia bela broŝuro priskribas la kastelojn kaj parkojn de Potsdam-Sanssouci. Ĝi estas 24-paĝa kaj haveblas ĉe UEA.

...

La Internacia Societo de Amikeco kaj Bonvolo festis sian dekan datrevenon en 1988. Ĝia adreso estas: Prez. Stanley J. Drake, P.O.Box 2637, NC 28053-2637, Usono.

...

La klubo Kolombo de Paco organizas fotoekspozicion sub titolo "Esperanto, Paco, Planedo, Ni". Kontakto: Vasil Stanoviĉ, 293720 Drohobic, Lvov obl. Ukrainio, P K 20, Sovetunio.

...

Esperanto-Asocio de Estonio estas la nova nomo de la estona organizo. La adreso estas la antaŭa: Olevimägi 12/14, SU-200101 Tallin, Sovetunio.

...

Slovakia Esperanto-Asocio, adreso: Sobotskó n mestie 6, CS-058 01 Poprad, Ĉeĥoslovakio, pretas sendi al vi informojn pri siaj plej gravaj aranĝoj dum 1989.

### Beethoven-Domo

En jaro 1802 Ludwig van Beethoven skribis sian testamenton en Wien-Heiligenstadt. Lia domo tie nun estas Beethoven-memorejo, kaj tie oni povas aĉeti kopion de la testamento. Grupo de vienaj esperantistoj faris esperantlingvan kopion, kiu ankaŭ estas aĉetebla tie. Skribu al: Beethoven-Gesellschaft, Probusgasse 6, A-1190 Wien, Aŭstrio.

La esperantlingva Radio Aŭstrio elradiis programon pri la Beethoven-Domo, kies teksto estas senpage ricevebla ĉe: Radio Österreich International, Esperanto-redakcio, A-1136 Wien, Aŭstrio. Oni postulu kopion de la programo de la 10-a de januaro 1988 (Beethoven-testamento).

STEN SVENONIUS

ERIKSTORPSSGATAN 26 A

217 54 MALMÖ

-2

# Hoteloj

Cambroprezoj de kelkaj hoteloj en Norrköping proksimaj al la kongresejo (semajnfinaĵoj):

	Unulita	Dulita	Telefono
Prezident Hotel	415.-	520.-	011/129520
Grand Hotel	380.-	485.-	011/197100
Standard Hotel	310.-	470.-	011/129220
Hotell Drott	225.-	350.-	011/180060
Rådhushotellet	190.-	290.-	011/129455
Linden Hotel	175.-	275.-	011/125700
Junulargastejo			
membroj	65.-		
aliaj	90.-		011/101160

## MEDLEMSAVGIFT I UEA FÖR 1989

Det är hög tid att betala medlemsavgiften till UEA för 1989. Avgiften är för:

<b>MJ</b> , medlem med årsbok,	100 kr
<b>MA</b> , medlem med årsbok och tidningen Esperanto,	250 kr
<b>Societo Zamenhof</b> , som är en stödjande kategori och inte inkluderar medlemskap i UEA,	500 kr.

Den person, som den 1 januari ännu inte fyllt 26 år, får dessutom ungdomsförbundets tidning kontakto.

Avgiften kan betalas in på pg 14 74 29 - 5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad betalningen avser.

Frågor kan göras hos **Lisbet Andreasson**, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel 0415-50152.

(de paĝo 3)

1988 estis eĉ pli kontentiga. Vi donacis preskaŭ 58.000 kronojn!


**VARMAN KAJ KORAN DANKON!** Kune kun la loteria gajno tio signifos plifortigon de nia ekonomio, malgraŭ plialtigo de la lukosto en Brunnsgatan kaj generala altigo de kostoj. Ni laboros por ke tiu ekonomia plibonigo montriĝu en nia rezulto.

Karin Lindquist

## Esperanto- examen

Skrivningsdag för Esperantoexamen blir i år den 23 april. Såväl lägre som högre examen kan avläggas. För vidare upplysningar om reglemente, krav och kostnader, vänd er till:

**Svenska Esperantoinstitutet**  
c/o Ebbe Vilborg  
Prästgårdsängen 2  
412 71 Göteborg



## Diamanter

Köpa? Sälja? Alltid bästa pris från Svensk Diamantförmedling.  
Ring Evald Lind (medl. i SEF) 0520/169 10